# *Kuba prezidento akceptis delegacion de la usona agrikultura sektoro*



**Foto: Studio Revolución**

Havano, feb 20 (RHK) Prezidento Miguel Díaz-Canel akceptis sekretariojn pri agrikulturo el pluraj nordamerikaj ?tatoj kaj reprezentantoj de tiu sektoro vizitantaj Kubon, elstarigante, ke li ?iam klopodis por trovi vojojn, kiuj detruas murojn.

Estas plezuro kaj kontentigo havi ilin ?eestantaj en Kubo en tiel grava nivelo, diris Díaz-Canel, citita de la ?urnalo Granma.

Li memorigis, ke Kubo havas longda?ran rilaton kun tiu sektoro, kiu ?iam laboris por trovi vojojn al pli granda proksimi?o kaj profito por amba? landoj.

Se ne estus la blokado (ekonomia kaj komerca) , ni havus multajn reciprokajn ?ancojn labori, progresi por profito de amba? popoloj, li emfazis.

Pligrandigante tiusence, li diris, ke ekzistas konstanta dialogo inter Kubo kaj usonaj kamparanoj, kaj delegacioj de tiu sektoro estas ofte akceptataj sur la insulo.

?i-okaze, estas la unua fojo, ke la Nacia Asocio de Departementoj pri Agrikulturo de Usono (Nasda) organizas mision viziti Kubon, la? la fonto.

Tiun kunvenon partoprenis Ted A. McKinney, prezidanto de Nasda; Megan McDonald, oficialulo de tiu unuo; Donald F. Lamb, direktoro de la Indianaa Sekcio de Agrikulturo; Bryan Paul Hurbult, Konektikuta Sekretario de Agrikulturo; kaj iliaj ekvivalentoj de Montano kaj Luiziano, Christine R. Clark kaj Michael Strain, respektive.

Anka? partoprenis Blake D. Ramsey, Nasda Market Promotion Officer; Thomas E. Peterson, Minesota Sekretario de Agrikulturo; Ronald J. Karney, oficialulo de la menciita asocio, Amanda Beal, Majna Agrikulturo-Komisaro; kaj Hugh Weathers, lia suda Karolina ekvivalento.

Same Ernesto Barón, reprezentanto de la asocioj Usapeec kaj USA Rice Federation; kaj Paul Johnson, kunprezidanto de la Agrikultura Koalicio por Kubo.

La usona agrikultura sektoro aperas kiel unu el la plej aktivaj favore al plibonigo de duflankaj rilatoj kaj ?esigo de trudaj rimedoj.

Kiel precizigite, usonaj kamparanoj subtenis le?proponojn por fleksigi regulojn pri blokado, kiel tiuj, kiuj kontra?as la malpermeson de voja?o al Kubo kaj tiuj celantaj favori kreditojn kaj akiri rajtigon por kuba eksporto al la alia nacio.

Oni memoris anka?, ke dum siaj du restadoj en Novjorko, prezidento Díaz-Canel okazigis renkonti?ojn kun reprezentantoj de la sektoro, al kiuj li ratifis la volon de sia Registaro pligrandigi la ligojn.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/347706-kuba-prezidento-akceptis-delegacion-de-la-usona-agrikultura-sektoro

Radio Habana Cuba